

BULGARA ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

la numero:

LA KONGRESO
DE BEA —
ANONCITA

LA HEROAJO DE
BULGARAJ
SOLDATOJ

VIVO DEDIĈITA
AL ESPERANTO

DE-JUNULARO
FESTAS

IMPRESOJ EL
JAPANIO

LANDA MOVADO

SANĜOJ EN LA
STATUTO DE BEA

PROGRAMO DE
BEA POR 1985

INTERNACIA
MATRATORA KINO-
FESTIVALO



LA HEROAJO DE LA BULGARAJ SOLDATOJ

(40 jaroj de la Patrolanda Milito kontraŭ faŝisma Germanio)

Post la sukcesplena militoperacio kontraŭ la hitlero-faŝistaj trupoj en la regiono de Jaŝ-Kiŝinev en Rumanio, en la komenco de septembro 1944 la Ruĝa Armeo atingis la bordojn de Danubo.

La Bulgara Popolliberiga Ribela Armeo (NOVA) proklamis tutpopolan kontraŭfaŝisman revolucion kaj ordonis al la partizanaĵ taĉmentoj el ĉiuj dekdu ribelaj regionoj direktiĝi al la plej proksimaj administraj centroj, okupi ilin kaj renversi la monarko-faŝistan reĝimon en la tuta lando.

La glora venka socialisma revolucio en Bulgario je la 9-a de septembro 1944 malfermis la nordan landlimon al Tria Ukraina Fronto de la Ruĝa Armeo sub la komando de la fama marŝalo Feodor Tolbuĥin. La registaro de la Patrolanda Fronto proklamis militon kontraŭ hitlera Germanio kaj mobilizis ĉiujn militfortojn en la lando. La malsuprenirintaj de la montaroj partizanoj aliĝis al la noveformita Unua Bulgara Armeo sub la komando de generalo-kolonelo Vladimir Stojĉev kaj kune kun la armeoj de Tria Ukraina Fronto komencis sanktan batalon kontraŭ la hitlero-faŝistaj okupantoj.

Pli ol 250 tagojn daŭris la Patrolanda Milito de la bulgara popolo kontraŭ hitlera Germanio. Sur la teritorio de Jugoslavio kaj Hungario la soldatoj de Unua Bulgara Armeo plenumis sian internacian devon kaj en sangaj bataloj montris ekskluzivan bravecon, altan militspiriton kaj disciplinon. La bulgaraj soldatoj kaj oficiroj batalis por liberigo de la ĉefurbo de Jugoslavio — Beogrado, de la urboj Prokuple kaj Priŝtina kaj tiamaniere haltigis la retirigon de la hitleristaj milittrupoj el Grekujo. Grava kontribuo de la bulgara armeo estis la frakaso de la elita hitlerista blendita tankdivizio „Princo Eŭgeno“, la heroaj atakoj de la defendpunktoj sur la altaĵoj de Strajin kaj Stracin, kiuj glorigis la bulgarajn soldatojn.

Glora paĝo el la historio de la Patrolanda Milito estas la kruelaj sangaj bataloj de Unua Bulgara Armeo sur la kampoj de Hungario dum la frua printempo de 1945. Nefor-

gesebla estas la fama Drava-epopeo, la atakoj de rivero Drava, ĉe kies transiro pereis miloj la bulgaraj soldatoj. Per sia heroa morto ili ebligis la venkan marŝon de la Ruĝa Armeo al Budapeŝto, Vieno kaj Berlino. . . La nomoj de vilaĝoj Drava-Csehy, Drava-Polkonya, de urboj Kaposvar, Szigetvar, Siklos kaj Pecs memorigos al la estontaj generacioj pri la heroeco de la bulgara popola armeo.

Pli ol 250 mil bulgaraj soldatoj kaj oficiroj lasis siajn ostojn sur la batalkampoj de Jugoslavio, Hungario kaj Aŭstrio dum la Patrolanda Milito.

En multaj militordonoj de la Ĉefstabo de la Ruĝa Armeo kaj de Tria Ukraina Fronto estis esprimita speciala laŭdo kaj estis alte rekonita la heroeco kaj la kontribuo de la bulgaraj soldatoj, kiuj digne defendis la prestiĝon de nova Bulgario en la batalo de la popoloj kontraŭ hitlera Germanio.

En tiu batalo partoprenis ankaŭ multaj bulgaraj esperantistoj, fidelaj al sia internacia devo. En la analoj de la milito estis enskribitaj la nomoj de la esperantistoj Stefan Ĥalaĉev, Vasil Demirevski — Jelju, Georgi Jovĉev — Goŝkata, Ilija Miĥajlov kaj multaj aliaj.

La danka bulgara popolo neniam forgesos iliajn heroecon kaj sinoferon.

En la malgranda hungara urbo Harkany estas moderna blanka konstruaĵo. Ĉe ĝia enirejo staras kanono-trofeo de la Dua Mondmilito. Tiu konstruaĵo estas la Muzeo de Unua Bulgara Armeo, omaĝo de la danka hungara popolo al la bulgaraj soldatoj pereintaj por la liberigo de Hungario elsub hitlero-faŝista jugo. Kaj proksime de la urbo, en direkto al Pecs, troviĝas la tombejo de la bulgaraj soldatoj, ame kaj respektoplene prizorgata de la tuta loĝantaro de Harkany.

La sinofero de la bravuloj ĉiam vivos en la koroj de la dankaj generacioj.

Eternan gloron al la bulgaraj soldatoj kaj oficiroj, pereintaj en la Patrolanda Milito!

RADI BANĈEVSKI

La Stata Soveto de Popola Respubliko Bulgario distingis per la plej alta ordeno „Georgi Dimitrov“ STOJAN NIKOLOV TANEV el Pazarĝik pro lia aktiva partopreno en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo, pro lia sinofera laboro en la konstruado de la socialismo kaj lige kun lia 75-jariĝo.

La bulgaraj esperantistoj elkore gratulas la multjaran esperantiston-aktivulon kaj bondeziras al li sanon, longan vivon kaj pluan aktivadon en la kampo de la Bulgara E-movado.



DECIDO

de la Buroo de Centra Estraro de Bulgara
Esperantista Asocio de la 3-a de decembro 1984

En sia kunsido la Buroo de CE de BEA decidis:

I. La sekva 41-a kongreso de BEA okazu la 6-an kaj 7-an de julio 1985 en Sofio en halo „Georgi Kirkov“.

II. Difinas la jenan tagordon:

1. Raporto pri la laboro de CE de BEA dum la periodo inter la 40-a kaj 41-a kongresoj de BEA.
Raportas: Hristo Gorov,
prezidanto de BEA

2. Raporto de la Centra Kontrola Komisiono:

Raportas: Georgi Dolapčev,
prezidanto de la CKK

3. Sangoj kaj aldonoj en la statuto.

Raportas: Dimităr Papazov,
sekretario de BEA

4. Elekto de nova CE kaj CKK.

III. Konfirmas normon por elekto de delegitoj por la kongreso — po unu delegito je 10 asociaj membroj.

IV. Sangoj kaj aldonoj en la Statuto de BEA.

NOBLA ANTAŬKONGRESA

KONKURADO

Antaŭ la 41-a kongreso de Bulgara Esperantista Asocio, kiu okazos en julio j. k., la Centra Estraro de BEA anoncis konkuradon inter la esperantistaro el la tuta lando, kies ĉefa celo estas la pliakivigo de ĉiuj asociaj societoj, sekcioj kaj kluboj. Ili konkuros inter si kaj pri la rezultoj de la konkurado respondecos speciala kvinmembra Centra Komisiono ĉe CE de BEA. Ankaŭ ĉe la Distriktaj Estraroj de BEA funkcios komisionoj, kiuj observos la konkuradon inter la societoj en la apartaj distriktaj organizaĵoj. Gis la 30-a de aprilo 1985 tiuj komisionoj devas pritaksi kaj proponi al la Centra Komisiono po tri el la plej eminentaj societoj, elinter kiuj ĝi elektos kaj anoncos la premiitojn.

La konkurado inter la esperantaj societoj realigos laŭ poentoj kaj laŭ diversaj indicoj. La unua grupo de tiuj determinaj indicoj rilatas la organizon kaj la kultur-klerigan aktivadon de la E-societoj. Ili celas la altiron de pliaj novaj asociaj membroj, la efektivigon de komunaj aranĝoj kun aliaj amasaj organizaĵoj, de aranĝoj pri pacdefendo, k. a.

La dua grupo da indicoj celas la plialtigon de la nombro de la abonantoj por la asociaj periodaj eldonoj, samkiel la plibonigon de la instru-laboro de Esperanto dum la kurlanta lernojaro. Oni turnas specialan atenton al la konsiderinda plenumo de la kontrolaj ciferoj por abono al „Bulgara Esperantisto“, „Paco“ kaj

„Scienca mondo“ kaj al la organizo de civitanaj kursoj aŭ de lernejanaj fakultativaj kursoj de Esperanto.

La unua grupo da indicoj rilatas la praktikan aplikadon de Esperanto kaj la soci-utilan rolon de la esperantistaro. Tiamaniere oni stimulas la utiligon de l'alilanda sperto pere de Esperanto la konscian kaj altkvalitan laboron de la esperantistoj.

La konkurado inter la Distriktaj Estraroj de BEA efektiviĝas surbaze de la samaj indicoj kaj de la sumigo de rezultoj atingitaj far apartaj E-societoj, aldonante al ili la indicon „fondiĝo de novaj esperantaj societoj kaj kluboj“. Pere de diversnombraj poentoj estas stimolata la fondiĝo de societoj kaj kluboj en diversaj medioj. Plej alte estas taksata la fondiĝo de nova E-societo aŭ klubo en uzino, entrepreno aŭ en oficejo. Laŭvice sekvas la fondiĝo de novaj E-societoj kaj kluboj fare de studentoj, junuloj, lernantoj, k. a.

La konkurado inter la sekcioj ankaŭ efektiviĝas laŭ poentoj kaj indicoj cele de fondiĝo de novaj E-societoj laŭ profesioj kaj interesiĝoj, de aplikado de alilanda sperto pere de Esperanto, popularigo de nia bulgara sperto en fremdlando, samkiel komuna aktivado kun diversaj profesiaj kaj fakaj organizoj.

Resume, la antaŭkongresa konkurado celas direkti la esperantajn societojn, Distriktajn Es-

trarojn, la E-sekciojn kaj ĉiujn esperantistojn al plivastigo de ilia aktivado, kaj la uzadon de Esperanto favore al aliaj sociaj organizoj, al soci-utila laboro.

La rezultoj de la konkurado estos raportitaj antaŭ la kongresanoj. La gajnintoj ricevos monpremiojn. Krome la Distriktaj Estraroj povas distingi E-societojn, gajnintajn unuajn lokojn en la asocia konkurado, kaj aparte iujn aktivulojn, kontribuintajn por la sukcesoj de la distrikta E-organizo. La Distriktaj Estraroj povas aparte distingi iujn esperantistojn, kiuj per sia fervora aktivado helpis la sukcesan konkuradon de sia E-societo.

La asocia antaŭkongresa konkurado bone evoluas.

La plejparto el la Distriktaj Estraroj tuj post la Plenkunsido de CE de BEA anoncis la antaŭkongresan konkuradon inter siaj societoj. Kelkaj el ili eĉ ellaboris proprajn indicojn, konsiderante la specifajn kondiĉojn.

Multaj esperantaj societoj, Distriktaj Estraroj kaj E-sekcioj jam fervore aktivadas kaj firme iras al la unuaj lokoj en la konkurado. Estas necese, ke ĉiuj societoj, estraroj kaj unuopaj esperantistoj eklaboru vigle kaj entuziasme por digne partopreni kaj gajni la noblan antaŭkongresan konkuradon.

DIMITAR PAPAZOV,
sekretario de BEA

niaj E-veteranoj

VIVO DEDIĈITA AL ESPERANTO

Nikola Aleksiev, Stojan Kostadinov, Kiril Drajev — la homoj, kies vivon kaj E-agadon niaj samideanoj ne nur bone konas, sed profunde estimas. Por esprimi sian rekonon al la tri jubileuloj, la sofia esperantistaro, reprezentantoj de la movado el la lando kaj eksterlando kunvenis la 5-an de decembro pasintjare en la salono de Domo de la Konstruistoj. Ne hazarde CE de BEA kaj Sofia E-Kultura Centro „Maksim Gorkij“ organizis tiun solenaĵon enkadre de la tagoj, kiam ni celebris 125-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof. Pli ol 60 jarojn de sia vivo Aleksiev, Kostadinov kaj Drajev dediĉis al la disvastiĝo kaj evoluo de la Internacia Lingvo, al la batalo por paco kaj amikaj kontaktoj inter la popoloj.

La celebron gvidis la prezidanto de CE de BEA Hristo Gorov, kiu donis la parolon unue al la ĝenerala sekretario de Hungara Esperanto-Asocio Endre Baráth:

„Karaj Aleksiev, Kostadinov kaj Drajev, vi estas distingitaj per plej altaj ordenoj kaj medaloj kaj ili estas rimarkinda afero. Sed la sento de viaj kamaradoj, kiun ili hodiaŭ esprimas al vi estas la plej valora pritakso. En

la nomo de hungaraj esperantistoj, kiuj konas vian vivon kaj aktivecon, mi deziras danki al vi pri ĉio, kion vi faris por prosperigi la esperantistan movadon. Bondezirojn al vi, amikoj!“

Per ardaĵ vortoj sin turnis al la jubileuloj la ĝenerala sekretario de BEA Kunčo Vălev, kiu parolis pri ilia vivo kaj agado.

PER PLUMO KAJ VIGLA PENSO. . .

Nikola Aleksiev estas naskita en 1909 en u. Berkovica, distrikto de Miĥajlovgrad — en malriĉa familio. Kun Esperanto li konatiĝis kiel gimnaziano kaj antaŭ la 9-a de septembro 1944 li uzas ĝin en la kontraŭfaŝisma batalo. Kontraŭfaŝisto, komunisto, esperantisto — en 1930 li estigas iniciatinto de la Bulgara Laborista Esperantista Asocio kaj ĝia unua sekretario. Ok jarojn Nikola Aleksiev travivas en faŝistaj malliberejoj. Post la venko de la socialisma revolucio en nia lando li estas sekretario de Centra Komitato de Bulgaraj Sindikatoj kaj ĉefredaktoro de ties presorgano — ĵurnalo „Trud“ (Laboro). Dek du jarojn li prezidas BEA, 15 jarojn — MEM, post kio li estas

elektita honora prezidanto de tiu organizaĵo. Multajn jarojn li estas komitatano de UEA, kaj poste — honora membro de UEA.

Sed la ĝenerala aktiveco de Nikola Aleksiev estas ĵurnalismo. Kiel ĵurnalisto li batalas kontraŭ faŝismo, por paco kaj demokratio.



Niaj karaj jubileuloj dum solena celebrado (de maldekstre — dekstren): Stojan Kostadinov, Kiril Drajev kaj Nikola Aleksiev.

Li redaktas ĵurnalon „Studentska tribuna“ (Studenta Tribuno). Fondas kaj redaktas ĵ. „Antifaŝistki front“ (Kontraŭfaŝisma Fronto), kiu pledas por Georgi Dimitrov dum Lejpciga Juĝproceso. Redaktas ankaŭ la ĵurnalojn „Edinstvo“ (Unueco), „Bezraboten“ (Senlaborulo), „Metalorabotnik“ (Metallaboristo) k. a. Li estas fondinto kaj redaktoro de ĵ. „Gerven far“ (Ruĝa Lumturo). En la 30-aj jaroj redaktas E-periodaĵojn kun kontraŭfaŝisma karaktero: revuon „Balkana Laboristo“ kaj bulgarlingvajn ĵurnalojn „Mejdunaroden ezik“ (Internacia Lingvo) kaj „Mejdunaroden rabselkor“ (Internacia Laborista-Kampana Korespondanto). Per materialoj, ricevataj en Esperanto li helpas la verkaron de ĉiuj tiamaj laboristaj periodaĵoj en nia lando: „Edinstvo“ (Unueco), „Pogled“ (Rigardo) kaj „Rabotnička“ (Laboristino).

Nikola Aleksiev nun estas redaktoro de E-gazeto „Pacaktivulo“. Aŭtoro de kelkaj libroj: „En la vicoj de la klaso“, „Instruistoj kaj kamaradoj“, „Georgi Dimitrov pri la E-movado kaj la porpaca batalo“. Li tradukas en Esperanton la librojn „Apostolo de la libero“ de „Mercia MacDermott“, „Mia vivo“ de Trifon Hristovski kaj „Biografio de Georgo Dimitrov“ de Petra Radenkova.

Pro sia aktiva socia kaj ĵurnalista agado Nikola Aleksiev estas distingita per la titolo „Heroo de la socialisma laboro“, dufoje estas distingita per la plej supera bulgara ordeno „Georgi Dimitrov“, per du ordenoj „Popola Respubliko Bulgario — I grado kaj du ordenoj „Naŭa de Septembro“, per multaj medaloj k. a. Li estas portanto ankaŭ de vico da alilandaj distingoj: Ora Memora Medalo „Lenin“

de Supera Soveto de USSR, Ora Medalo „Johannes Becher“ (Kulturligo de GDR), Honordiplomo kaj Medalo „Julius Fuĉik“ (Prezidio de Internacia Organizo de Ĵurnalistoj) k. a.

EN LA LERNEJO DE LA VIVO

Stojan Kostadinov estas esperantisto ekde 1923. En 1904 li naskiĝas en v. Kozarsko, Pazarĝik-distrikto, en malriĉa familio, pro kio li ricevis nur fundamentan kleracon. Lin hardas la vivo, la partio, la antifaŝisma batalo. Antaŭ la 9-a de Septembro 1944 li laboras kiel muntisto kaj maŝinisto en diversaj fabrikoj. Li estas ofte arestata kaj inkviziciata, kvarfoje kuŝas en la faŝismaj malliberejoj.

Post la Naŭaseptembra venko li okupas diversajn respondecajn politikajn kaj ekonomiajn postenojn. Multajn jarojn li estas organiza sekretario de BEA, kaj ĉi-momente estas prezidanto de Sekcio de la Veteranoj ĉe BEA.

Stojan Kostadinov estas portanto de la ordenoj „Georgi Dimitrov“ kaj „Popola Respubliko Bulgario“ — I grado.

LA GRANDA AMO — LA TEATRO

Kiril Drajev estas virtuoza grafikisto. Li laboras en Stata Presejo „Georgi Dimitrov“, en humura ĵurnalo „Stâršel“ (Krabro), instruas en la Pentroarta Akademio, „Nikolaj Pavloviĉ“.

Drajev estas fondinto kaj unua sekretario de la junulara E-societo en lia naskiĝurbo Radomir. Kaj tio estas la unua organiza manifestado de la esperantistiginta en 1923 junulo. Poste li dediĉas sin al fervora E-agado. Li gvidas multajn kursojn de la Internacia Lingvo, redaktas E-elsendojn en Radio Sofio.

En la momento Drajev estas arta aranĝanto de revuo „Paco“.

Sed la bulgara kaj alilanda esperantistaro ligos ĉiam la nomon de K. Drajev kun Bulgara Esperanta Teatro. Unu el ĝiaj kreintoj, 25 jarojn K. Drajev dediĉas al ĝi. Por la celoj de la teatro li tradukas pli ol 20 teatraĵojn.

Pro sia multjara laboro kiel gvidanto de la teatro kaj pro sia E-aktiveco pasintjare la 80-jara esperantisto estas elektita honora membro de UEA. Li estas portanto de la ordeno „Ruĝa standardo de la laboro“.

* * *

Multan freŝan humoron donis al la celebrado de la veteranoj la belarta programo, kiun sperte kompilis Maria Angelova.

M. BOJAŬIEVA

Duobla jubileo



La jubileulo Marin Bârdarov (meze staranta) kune kun novaĵ adeptoj de la Internacia Lingvo.

La 17-an de oktobro 1984 en la nova urbeto Borovo, distrikto de Ruse, la lokaj esperantistoj celebris la 80-jariĝon kaj 60-jaran esperantistan agadon de Marin Ivanov Bârdarov. La solenaĵo kunvenigis gastojn el la najbara urbo Dve Mogili kaj el vilaĝo Batišnica. Ĉeestis la sekretario de DE de BEA Ivan Ivanov.

La prezidantino de societo „Lumo“ Janka Milanova emociie raportis pri la maltrankvila kreo vivo de la veterano-esperantisto.

Marin Bârdarov estas fondinto de E-societo „Lumo“ en Borovo (en 1936) kaj multjara ĝia prezidanto. Li gvidis kursojn de Esperanto, partoprenis multajn landajn E-kongresojn, renkontiĝis kun diversaj fremdlandaj esperantistoj jam antaŭ 50—60 jaroj.

En la nomo de CE de BEA Draguŝko Petrov transdonis al la jubileulo la oran insignon de BEA. Kaj en la nomo de la esperantistaro el Ruse la veteranon salutis S. Vojčev. Poste pri li parolis lia kamarado d-ro Vasilev.

M. Bârdarov laboris aktive kiel soci-agan-to. Jam 40 jarojn li estas membro de la Bulgara Komunista Partio. Pro tio lin salutis reprezentanto de la komunuma komitato de BKP — Jordan Maksimov, reprezentanto de la Patrolanda Fronto — P. Velikova k. a.

Fine en la nomo de societo „Lumo“ — Borovo, Marin Bârdarov estis sincere salutita de Ivan Nečev, sekretario de la E-societo.

La jubileulo ricevis donacojn, florojn kaj... multajn kisojn.

Profunde kortuŝita, li respondis al la salut-paroloj, deklamis esperantlingve versaĵojn.

IVAN NEČEV,
sekretario de E-societo „Lumo“ — Borovo

Unu el la plej grandaj

„Ekzistas homoj, kies vivovojo estas streĉa laboro kaj senĉesa penado. Ili estas persekutataj, ofendataj, primokataj, destinitaj porti la krucon de la suferado laŭ la kruta vojo al sia Golgoto. Supreniro de tiuj homoj komenciĝas nur post ilia morto. Kaj kiom pli la tempo pasas, tiom pli rapide ilia gloro kreskas en la konscio de la generacioj. Tiuj estas la grandaj saĝuloj de la homaro. Inter ili oni devas distingi ankaŭ la polan humaniston kaj kreinton de la Internacia Lingvo Esperanto — d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof“.

Per tiuj vortoj prof. Stojan Ĝuĝev — vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, komencis sian paroladon pri la vivo kaj agado de Zamenhof. Lian 125-an datrevenon la sofia esperantistaro celebris la 12-an de decembro 1984 en la salono de Pola Informa kaj Kultura Centro (PIKC). Ĉeestis Eugeniusz MieliCarek — konsilanto en la ambasado de Pollando en Bulgario kaj direktoro de PICK, Stefan Skrzynecki — unua sekretario de la sama ambasado kaj vicdirektoro de PICK, kiu salutis la gastojn.

Speciale invitita por la celebrazo de la

Varsovia Nacia Teatro Jerzy Fornał talente prezentis la spektaklon „Prikanti homan spiriton“.

Post la oficiala parto, kiun gvidis k.f.s. Cano Ignev — membro de la Buroo de UE de BEA, komenciĝis literatura-muzika programo, preparita de Esperantista Kultura Centro „Maksim Gorkij“. Ĝin bone organizis Nedka Valjavičarska.

Merita artistino Luna Davidova el la Nacia Junulara Teatro „L. Jivkova“ forte impresis la publikon per emocia plenumo de „La vojo“ de Zamenhof.

La publiko aplaudis ankaŭ la plenumon de la kantistoj Maria Angelova („Ho, mia kor!“ — teksto de Zamenhof, muziko de Canko Kolve kaj „Tagiĝo“ de Chopin) kaj Nevjana Krăsteva (pollingve „Kanto pri Varsovio“ de Segetynski). Belka Beleva — lektorino en la Supera Instituto pri Teatra Arto „Kr. Sarafov“ deklamis „Odo al la Juneco“ de Adam Mickiewicz en Esperanta traduko de Kalman Kalocsay. Bonan finon al la vespero donis plana plenumo de Ljudmila Babanova — sonis „Valso“ de Chopin.

M. JANKOVA

Studentaj tagoj en Pisanica

La festo de la bulgara studentaro — la 8-a de decembro — denove kunvenigis en Internacian E-Kursejon en Pisanica studentojn el la superaj lernejoj de Sofio, Plovdiv kaj Smoljan. Ĉeestis 200 gejunuloj, kiuj metis florojn antaŭ la memortabulo de d-ro Berov en la vilaĝo. Lia frato rakontis rememorojn.

Por la estontaj filologoj, ekonomiistoj, juristoj kaj medicinistoj la estraro de la Kursejo organizis interesan koncerton de ensemblo „Aero“ kaj amuzan kvizon, kiu pliriĉigis la konojn de la ĉeestantoj pri la historio de la internacia E-movado.

La dancoj, amuzigo kaj viglaj diskutoj estis konvinka pruvo, ke en la kurseja diskoteko la gestudentoj sin sentas bonege. Inter ili estis multaj simpatiantoj de Esperanto.

La korvarma gastamo kaj sukcesa aranĝo konsiderinde kontribuis al la efika propagando de Esperanto.

Dum la renkontigo oni faris bonajn konatiĝojn, kiuj promesas venigi novajn adeptojn de la Internacia Lingvo en niajn vicojn. Pri tio atestas ankaŭ la vortoj de Plamen Taŝev, studento el Plovdiv:

— Unu el miaj personaj taskoj de esperantisto estas varbi por nia nobla porpaca afero pli da gejunuloj. Tiu studenta festo, kiun mi partoprenis kune kun miaj amikoj-neesperantistoj donis al mi eblecon realigi certagrade ĉi-tiun celon.

JULIETA MANEVA

La junularo festas

La 19-an de decembro ĉi-jare en la sofia urba junulara domo „Liljana Dimitrova“, okazis amuzvespero, dediĉita al la 125-jariĝo de la naskiĝtago de d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof. La vespero estis organizita de la Kulturcentro „M. Gorkij“ kaj la Junulara Sekcio ĉe BEA ne nur por gejunuloj-esperantistoj, sed ankaŭ kun propaganda celo. Ĉeestis karaj gastoj — Ĥr. Gorov, ing. P. Todorov, d-ro Cvetta Stamenova, D. Ĥitrov, N. Nikolov, kiuj kune kun la junularo ĝuis la programon.

La programo estis varia kaj riĉa kaj la publiko ĝuis agrablajn minutojn.

La amuzo estis kombinita kun literaturaj plenumoj. La programgvidantoj konatigis la publikon (bulgarlingve kaj Esperante) pri gravaj momentoj el la historio de la E-movado. Ili montris ekzemplojn pri la taŭgeco kaj belsoneco de Esperanto per citaĵoj elektitaj el la monda literaturo.

Siaflanke la profesiaj junaj kantistoj Angel Angelov, Bogdan Kānev kaj Daniela Koleva, kantgrupo „Magistrali“ kaj la humoristoj Kina Mutafova kaj Nikolaj Pašov kreis gajan kaj agrablan etoson. Tiu ĉi amuzvespero estis bone organizita kaj diferencis de aliaj tradiciaj E-vesperoj. Okazis ankaŭ moda revuo. Oni montris belan kolekton da modeloj de la entrepreno „Vitoŝa“.

Post la riĉa programo okazis dancado.

MARIANA ELENOVA

Komisiono pri instruagado

Laŭ decido de la Buroo de CE de BEA (en ĝia kunsido, okazinta la 5-an de novembro 1984), estas kreita Komisiono pri Instruagado kun faktestro Violin Oljanov, sekretario Marin Bācev kaj membroj: Haĉik Haĉikjan, Ivan Pacov, Libertaria Mladenova, Nedka Valjaviĉarska, Zahari Ivanov kaj Bistra Dojĉinova.

La celo kaj la taskoj de la Komisiono pri Instru-Agado estas organizi kaj gvidi la E-instruadon en la lando per konstanta instruado, esplorado kaj helpado de la distriktaj estraroj kaj societoj, per seminarioj kaj refre-

ŝigaj kursoj por E-instruistoj, per metodika helpo, morala kaj materiala rekompencoj. La komisiono zorgos pri eldonado de lernolibroj, vortaroj kaj aliaj instruhelpiloj.


La komisiono pri Instru-Agado havas sian agadplanon, kiu jam estas efektivigata.

Ĉiuj kursgvidantoj kaj E-instruistoj, ĉiuj respondeculoj pri instru-agado ĉe DE kaj E-societoj estas petataj direkti ĉiujn siajn demandojn kaj informojn, ĉiujn postulojn kaj sugestojn al la sekretario de la Komisiono Marin Bācev (bul. Ĥr. Botev 97, 1373 Sofio).

JAPANIO — MALPROKSIMA KAJ PROKSIMA

(daŭrigo de n-ro 1/1985)

Matene, la 6-an de aŭgusto, malsuprenirinte en la korton, mi aŭdas tre konatan kaj amikan voĉon. Al mi, ridetanta kaj ĝoja, direktiĝas sinjoro Syozi Nanba, la sekretario de Japana Pacdefenda Esperantista Asocio. Hajlo da demandoj superŝutas min: „Kiel vi fartas? Ĉu vi bone dormis? Ĉu vi bone vojaĝis? Ĉu vi ne malsatas? Ĉu vi estas kontenta pri la akcepto de la japanaj esperantistoj?“ ktp. Kor-tuŝa zorgemo! Li konatigas min kun sia plej juna filino, kiu estas ege korinklina al sia patro. Sinjoro Syozi Nanba estas la motoro



Antaŭ la memorplato pri la atombombado de Hiroŝimo.

kaj la animo de la Japana Pacdefenda Esperantista Asocio. Tion mi konstatis multfoje dum mia restado en Japanio. Tre energia, konsiderema, iniciatema kaj akurata — li forte impresas min kaj mi senfine admiras lian ĉarman personecon.

La sepdeka jubilea kongreso de la japanaj esperantistoj malfermiĝis solene. Sub la sonoj de fanfara orkestro kaj la tondraj aplaŭdoj de la kongresanoj eniras la oficialaj gastoj — la urbestro de Kameoka sinjoro Joŝihisa Taniguĉi, reprezentantoj de la Loka Kongresa Komitato, reprezentantoj de aliaj japanaj Esperanto-organizaĵoj kaj la alilandaj delegitoj — ĉiuj ornamitaj japankutime per rozkoloraj floroj, lerte faritaj el ŝtofo. La urbestro sinjoro Joŝihisa Taniguĉi kore salutas en Esperanto la ĉeestantojn kaj ili varme aplaŭdas lin. Sekvas la salutparoloj de la ceteraj oficialaj gastoj. Ankaŭ mi prezentas sincerajn satulojn kaj bondezirojn en la nomo de la

bulgaraj esperantistoj kaj en mia propra nomo.


En la kadro de la unua kongresa tago estas aranĝitaj renkontiĝoj de japanaj esperantistoj kun la eksterlandaj gastoj. Dum la renkontiĝo kun mi, dediĉita al la Internacia Esperanto-Kursejo (IEK) en vilaĝo Pisanica, ili superŝutas min per demandoj. Aparte impresas ilin la lerno-eduka agado kaj la konstruaĵo mem de la Kursejo; la ŝtata financa apogo al Bulgara Esperantista Asocio; la multnombra pagata oficistaro, laboranta en la sistemo de Bulgara Esperantista Asocio; la intereso de la bulgaroj al la internacia lingvo Esperanto ktp.

Post la diversaj kunsidoj okazis „Interkona Vespero“ en vera japana atmosfero. La kongresanoj kaj la gastoj restas ravitaj de la tradicia japana muziko, plenumita de folkloraj ensemblo je taiko, kotoo kaj ŝakuhaĉo (japanaj muzikiloj). La koreaj junuloj per siaj ĉarmaj dancoj ankoraŭ plivigligas la gajan etoson. Ne mankas japana verda teo por la ŝatantoj kaj soifantoj.

La laboro de la kongreso daŭras sukcese. Oni raportas pri multaj atingoj, pri multaj pozitivaj rezultoj. La japanoj aparte ĝojas pri la nova Japana-Esperanta Vortaro. Por unua fojo sin prezentas en Esperanto la profesia pupteatro el urbo Nagoya per la belega kaj originala spektaklo „Issun-Boŝi“ (Pli poste tiu pupteatro partoprenis en la Pupteatra Internacia Festivalo en Zagrebo kaj ricevis premion pro sia bonega ludo). En la dua kongresa tago mi prelegis antaŭ ĉiuj esperantistoj pri temo „Bulgario dektrijarcenta“ kaj projekciis lumbildojn pri nia lando.

Aparte interesa por mi estis la renkontiĝo kun la japanaj esperantistoj — membroj de la Pacdefenda Esperantista Asocio. Ili estas senlaj adeptoj de la paco, homoj, kiuj senrezerve kaj kategorie batalas kontraŭ la milito. La Estraro de la Asocio per la aktivaj sinjoroj Kurita kaj Nanba raportas pri sia laboro dum la pasinta periodo, proponas novan planon por agado kaj apelacias al ĉiuj ĉeestantoj por pli granda aktiveco. Oni raportas, ke la japanaj membroj de tiu Asocio relative malmulte skribas pri sia agado en la organo de la Mondpaca Esperantista Movado „Paco“ kaj en sia organo „La Verda Kolombo“. Samtempe ĝojiga fakto tamen estas, ke ili ĉiuj estas abonantoj de „Paco“. Mi akceptis la afablan inviton kaj rakontis mallonge pri la agado de la Bulgara Komitato de Mondpaca Esperantista Movado (MEM).

Antaŭ la finiĝo de la dutaga laboro de la



En la Parko de paco en Nagasako.

jubilea kongreso oni premias la gajnintojn en la Oratora Konkurso, kaj ankaŭ la partopreninto en la Literatura Konkurso.

La 7-an de aŭgusto kune kun la sekretario de la Japano Esperantista Instituto sinjoro Moritaka Osioka mi forveturas al Hiroŝimo. Tie loĝas lia ĉarma edzino sinjorino Taeko Maeda, konata al iuj el la bulgaraj esperantistoj kiel granda pacamantino. Antaŭ kvar jaroj ŝi vizitis Sofion kiel membro de la japana pacdelegitaro, ekspoziciinta dokumentajn bildojn kaj pentraĵojn pri la kruela detruo de la urboj Hiroŝimo kaj Nagasako far usonaj atombomboj en 1945.

Gojradiante, ŝi renkontas nin varme ĉe la stacidomo.

La hejmo de Taeko Maeda estas modesta, sed komforta japana domo. Si estas instruistino

kaj ŝatas multe sian profesion. Si havas riĉan bibliotekon. Embarasas min la fakto, ke la geedzoj loĝas disigitaj — li en Tokio, ŝi — en Hiroŝimo. Mi baldaŭ komprenas la kialon. Se ŝi irus loĝi en la ĉefurbo, tiam ŝi perdus sian instruistan postenon. En Japanio, aparte en la grandaj urboj, estas malfacile trovi laboron. Tio speciale validas pri la instruistoj en tiu lando. Ili estas ŝtataj oficistoj kaj estas relative bone pagataj. La instruistoj kaj instruistinoj ricevas egalajn salajrojn, kompreneble, depende de la laborstaĝo. Taeko regalias nin per malvarmigataj pecoj de akvomelono.

Mi tranoktas ĉe la juna familio Kuniŝi.

Matene Moritaka kaj Taeko promenas min tra Hiroŝimo — suferinta urbo, simbolo de la detruo, cindrigo, radioaktiva infekto. La mondo neniam forgesos la 6-an de aŭgusto 1945. Memore al la miloj da senkulpaj pereintaj viktimoj, la japanoj konstruigis dekojn da monumentoj. Aparte konsternigan impreson faris al mi la monumento al la dektrijara knabino Sasaki Sadako. Sia historio estas mallonga. Kiam la atombombo falis sur la urbon, ŝi estis dujara kaj ŝajnis esti netuŝita. Sadako restis vigla infano kaj ne havis la simptomojn de la radia infekto. Kiam la knabino farigis dektrijara, ŝi malsaniĝis subite kaj nesaveble. En la malsanulejo ŝi aspiris resaniĝon kaj komencis fari papergruojn. Laŭ antikva japana legendo la gruoj vivas mil jarojn. La knabino kredis, ke se ŝi faros mil gruojn, ŝi nepre resaniĝos. Sed la senindulga morto trafis la infanon iom antaŭ ol ŝi atingis sian celon. Hodiaŭ en Japanio la gruo estas simbolo de la paco. Antaŭ la monumentoj al la atomaj viktimoj ĉiam estas dekoj da girlandoj el diverskoloraj gruoj, faritaj ĉefe de infanoj. En la muzeo de la atomaj viktimoj, troviĝanta sur vasta placo, estas montritaj la teruraĵoj de la atombombado. Forlasinte la muzeon kun medito pri la senŝenca kaj senrespondeca neniigo de homoj fare de homoj, oni ekhavas la senton de granda indigno kontraŭ la barbareco.

(daŭrigota)

VASJA CVETKOVA

FORSTISTA FAKVORTARO

Nuntempe ĉirkaŭ dudek forstistoj kaj aliaj personoj laboras por eldoni la jam delonge bezonatan forstistan fakvortaron en la Internacia Lingvo. Inter ili estas ankaŭ la bulgara forstisto Boris Dimitrov el urbo Velingrad. Estas planite eldoni la fakvortaron en ĉiuj lingvoj de Eŭropo, do: Nacilingvo-Esperanto, Esperanto-Nacilingvo.

Nuntempe estas eldonata „Forstista Informilo“ por membroj de la tradukgrupo. Tiu in-

formilo povus esti la Komenco de la planata „Eŭropa Forstista Gazeto“. Por la membroj de la tradukgrupo estas interese scii kion la aliaj opinias pri ilia laboro kaj pri la ideo eldoni fakvortarojn kaj fakan gazeton. Bonvolu skribi vian opinion al la estro de la „Internacia Fakgrupo de Esperanto-Forstistoj“ d-ro Karl Heinz Simon, Carl-von-Osietzky-str. 21, DDR, Eberswalde-Pinow.

GABROVO

La 11-an de oktobro pasintjare en la verda salono de la Domo de Kulturo Belčo Varsev—sekretario de DE de BEA malfermis la novan E-lernojaron. Ĉeestis 50 geinstruistoj kaj civitanoj.

Gastis membroj de la Distrikta kaj Urba Estraroj de BEA kaj la direktorino de la Distrikta Domo de la Instruisto (DDI) Ivanka Dimitrova. Angel Iliev — sekretario de la Distrikta Konsilantaro pri Popola Klerigado, salutis la ĉeestantojn kaj bondeziris al ili sukcesplenan laboron.

Hristo Botev kaj Darina Minčeva — partoprenantoj en la pasintjara porinstruista E-kurso ĉe la Distrikta Domo de la Instruisto, gvidata de Sonja Tiĥova salutis esperantlingve la estontajn E-kursanojn. Neno Janev parolis pri la Internacia Lingvo kaj pri ĝia facileco.

Oni formis tri kursojn por instruistoj kaj unu — por civitanoj, gvidotaj de Neno Janev, Sonja Tiĥova kaj Djanko Minčev.

S. T.

PLEVEN

La 1-an de oktobro pasintjare en la E-klubo sur strato „Canko Cerkovski“ 14 okazis solena malfermo de la nova lernejo. Junpioniroj plenumis konvenan literaturan-muzikan programon sub la gvidado de ilia instruistino Genoveva Rančeva — vicprezidentino de DE de BEA.

La prezidentino de DE de BEA Vâlka Dobрева enmanigis la diplomojn al la kursanoj, sukcese finintaj siajn studojn en la E-kursoj dum la lernejo 1983—1984 kaj bondeziris sanon kaj novajn bonajn rezultojn ĉe lernado de la Internacia Lingvo.

DIMITAR KAMENOPOLSKI

LOVEĈ

Okaze de la antaŭstaranta internacia esperantista kooperativa konferenco en nia lando, la Distrikta estraro de BEA kune kun la Estraro de la Distrikta Kooperativa Asocio en Loveĉ ekde februaro 1984 organizis Esperanto-kurson por kooperativaj oficistoj. Lektoro de la kurso estis la sekretario de DE de BEA. La 29-an de oktobro la kurso finiĝis kaj la atestiloj estis solene disdonitaj en la E-klubo ĉe la Distrikta Sindikata Kulturdomo. Ĉeestis gekursanoj, anoj de la ekzamenkomisiono kaj de la DE kaj la diplomitaj samtempe kursanoj-representantoj de alia Es-

peranto-kurso ĉe la trikfabrika „Stojan Edrev“, kun la fama esperantista lektoro Koljo Pančev.

La celo de la kurso estis kreo de Esperanto-grupo de la kooperativaj oficistoj ĉe la Distrikta Estraro de BEA por nacia kaj internacia agado kaj interŝanĝo de sperto kaj scioj en la kooperativa afero.

D-rino TJURAN OMER



E-kurso por kooperativaj oficistoj en Loveĉ
Foto: Kiril Kalčev

RUSE

Jam trian jaron ĉe DE de BEA ekzistas la Helpentreveno „Esperanto“. Sub la gvidado de Georgi Akalliev ĝi senĉese, konforme al la decidoj de la maja nacia konferenco en Ruse, disvastigas la agadon por produktado de konsumvaroj kaj por plibonigo de la servoj por la loĝantaro.

Unu el la iniciatoj de DE de BEA, dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto, estas la konstruado de distrikta E-domo. Tiamaniere oni realigas la multjaran revon de la esperantistoj en Ruse. La konstruado estas subvenciata de la Helpentreveno „Esperanto“ ĉe DE de BEA kaj de CE de BEA.

JORDAN KALINOV

KJUSTENDIL

Solena kunveno, dediĉita al la defendo de la paco, kunvenigis en la bela urbo Kjustendil reprezentantojn de DE de BEA, de la Distrikta kaj Komunuma Komitatoj por Defendo de la Paco, de la Komitato de la Kuracistoj kontraŭ la Nuklea Milito kaj esperantistoj el la loka societo „Flamo“. Post la kunveno la partoprenantoj aplaudis la riĉan artprogramon.

La interkona vespero pasis gaje kaj en bona esperantista etoso.

La partoprenantoj gastis en la „Domo de Paco“, organizita de Jordan Guglev en vilaĝo Dragoviŝtica, kvartalo „Perivol“. Tio estas privata ekspozicio, farita de la bona esperantisto, kun multaj pensoj kaj bondeziroj pri la homoj kaj la paco. Ne mankis ankaŭ angulo kun E-leteroj kaj libroj.

